

V-19479/28 (1959) dot.
Esperanto

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



6

JUNIO 1959 * JARO XXVIII

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01

Ĉefredaktoro: **Violin Oljanov**

Redakta komitato: **Ivan Sarafov,**
Stefka Hristova, Stefan Kiraĝiev,
Stefan Maserov, Simeon Simeo-
nov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Tarifo por reklamoj: 5 levoj por 1 cm²;
korespondanoncoj — 1 levo por
ĉiu vorto; eksterlandanaj adresoj
estas presataj senpage.



POR LA DUA DUONJARO

Estas jam akceptataj abon-
pagoj por la dua duonjaro de
1959 (7-12 n-roj). «Bulgara es-
perantisto» aperos en ĉiam pli
bela aspekto kun varia materia-
lo — literaturaĵoj, lingvaj de-
mandoj, enlanda movado, inter-
naciaj novaĵoj. La societoj or-
ganizu la varbadon de abonan-
toj. La nomoj de apartaj sami-
deanoj, kiuj enskribigos pli ol
10 abonantojn estos danke pu-
blikigataj en «Bulgara esperan-
tisto».

Asen Grigorov. Al alta lingva
nivelo (ĉefartikolo) 1

Organiza vivo 2

Marin Jonov, Dojĉin Stojkov.
Esperantistoj pereintaj por la
libero — Stojan Edrev 10

Ruĝa papavo (kanto) 12

Simeon Hesapĉiev. En la patrio
de Esperanto 13

Inĝ. Azaraj Perelman. Pri skri-
bado de diversnaciaj nomoj 14

Tra la gazetaro 15



LA REDAKCIO akceptas materia-
lojn por la koncerna numero de «Bul-
gara esperantisto» ĝis la 12-a de la
antaŭa monato. Nur kiel escepto gra-
vaj aktualaj materialoj estos akcep-
tataj ĝis la 25-a de la antaŭa monato.

La aŭtoroj estas petataj skribi tre
klare, kun granda interlinia spaco
kaj marĝeno. Manuskriptoj ne estas
resendataj.

La foto sur la kovrilo prezentas vidaĵon de
la apudmara urbo Burgas.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

POR ALTA LINGVA NIVelo

La rapida progreso de la Esp. movado en nia lando altiris al niaj vi-
coj grandan amason da novaj entuziasmaj esperantistoj, kiuj fervore apli-
kas la lingvon: korespondas, konversacias, parolas en niaj kluboj. Tio
estas tre bona — Esperanto, kiel ĉiu alia lingvo, pravigas sian ekziston, se
ĝi estas praktikata en la vivo.

Tiu ĉi amasa lernado kaj aplikado de nia lingvo tamen devas esti
akompanata de senĉesa perfektigo. La eraroj devas okazi pli kaj pli mal-
ofte. La malnovaj esperantistoj devas helpi la novajn. Ili devas instrui
ilin, korekti iliajn erarojn, perfektigi ilin. Tie ĉi tamen trudiĝas la deman-
do, ĉu multaj el la malnovaj esperantistoj perfekte scipovas Esperan-
ton? Kia estas la lingvonivelo de la plimulto el ni? Bedaŭrinde, la res-
pondo estas ne konsola! Dum la milito kaj dum la periodo de stagnado
de la movado en nia lando, multaj esperantistoj ne praktikis la lingvon,
ne parolis ĝin, ne legis Esperanto-literaturon, aŭ ilia okupiĝo pri la lingvo
estis malofta kaj hazarda. Ili multon forgesis. Kaj kiam nun ili volas pa-
roli, skribi, verki, redakti en Esperanto, ili konstatas, aŭ la aliaj samidea-
noj konstatas, ke ilia lingvo lamas, ke ili allasas netolereblajn erarojn
gramatikajn, ke ili pekas kontraŭ la akuzativo, ke ili ne scias, ekzemple
tian simplan regulon, ke infinitivo ne povas havi subjekton. Kiam ni tute
korekte diras: «Mi vidas lin venanta», alia «spertulo» «korektas: ne «ve-
nanta», sed «venantan»! Malnovaj samideanoj diras: «Estas dezirinde ni
iri al la kongreso» ktp. Oni ofte povas aŭdi «Okazos ion», «Mi plaĉas tion»
kaj similajn monstre erarajn esprimojn.

Ja en la pasinteco, kiam nia afero estis neglektata, kiam ni devis
oferi tempon, fortojn kaj riski nian liberecon kaj sanon por nia movado,
por eldoni gazeton, libron, por gvidi kurson ktp, tiu ĉi situacio, per si mem
ne tolerebla, povis esti se ne pravigata, almenaŭ klarigata per la manko
de kondiĉoj pri pli bonkvalita laboro. Sed nun, kiam ni-bulgaraj esperan-
tistoj havas bonegajn kondiĉojn pri diversflanka fruktodona laboro, kiam
ni disponas pri gazetoj, eldonataj de fortaj organizaĵoj kiel la Komitato
de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun alilando, la Dimitrova unuiĝo de la ko-
munista junularo k.a., kiam nia popola respubliko disaŭdigas per la radio,

eldonas librojn kaj broŝurojn, subtenas nian movadon, nun ne plu ekzistas klarigo kaj pravigo pri fuŝa Esperanto.

Nun la E-movado devas iom post iom, sisteme kaj konstante, disvolviĝi kaj kreski ne nur kvante, sed ankaŭ kvalite. Grandan respondecon pri tiu proceso havas la malnovaj esperantistoj. Ili devas elradiki siajn erarojn, ĉar instruante en kursoj, ili faras nekuraceblajn domaĝojn al la tuta nova generacio da esperantistoj; redaktante fuŝe gazeton, ili venenas la legantojn per malbona lingva nutraĵo, unuvorte — ili fariĝas kulturan-toj kaj subtenantoj de tiu erarplena lingvo, kiun ili siatempe lernis kaj de kiu ili ĝis nun ne sukcesis liberiĝi.

Ni ĉiuj — novaj kaj malnovaj — devas sisteme, ĉiutage legi bonstilaĵajn verkojn de niaj klasikuloj — Zamenhof, Kabe, Baghy, Kaloczaj k.a.

Ni devas havi la ambicion kaj la obstinan volon senĉese, serioze kaj profunde lerni kaj korekte, senerare uzi nian mirinde belan lingvon. Ni devas konstante, ĉiutage inter esperantistoj paroli esperante, en konversacioj kaj en kunvenoj kaj kunsidoj, en konferencoj, ekskursoj kaj festoj.

Ni devas peti pli spertajn s-anojn montri al ni niajn erarojn. Studante kaj analizante ilin, ni plej bone venkos ilin.

La urĝaj taskoj de nia movado postulas kreon de kapablaj, posedantaj lingvan senton samideanoj, kiuj en mallonga templimo fariĝu lertaj kaj spertaj korespondantoj, kursgvidantoj, lektoroj en lernejoj, tradukistoj, redaktoroj, verkistoj.

De la homoj, kiuj instruas la lingvon, kiuj verkas, tradukas kaj redaktas — de ili grandparte dependas la ĝenerala leviĝo de la malalta nivelo de nia lingvo en Bulgario.

«Bulgara esperantisto» devas turni pli da atento al la lingvoproblemoj. La farita komenco estas bona, sed ĝi estas tamen nur komenco. Ĝi devas esti daŭrigita kaj vastigita.

La societoj devas pripensi diversajn aranĝojn por la lingva perfektigo de siaj membroj. Oni devas interŝanĝi spertojn, montri la sukcesojn, vidigi la difektojn, por kuraci ilin.

Esperanto estas nia instrumento, nia armilo en la porpaca batalo, en niaj interrilatoj kun alilando. Ni akriĝu tiun ĉi armilon, ĝi brilu en sia plena senmakula pureco kaj mirinda beleco!

ORGANIZA vivo

Loveĉ. La 20-an de marto 1959 okazis la jarkunveno de la E-societo «Espero». Marko Bliznakov raportis pri la vivo kaj agado de la societo dum 1958. La raporto estis unuanime aprobita. Prezidanto de la societo estis reelektita Marko Bliz-

nakov, sekretario — Iv. Stojanov. En la komenco de aprilo, antaŭ la balotoj, ni aranĝis propagandan vitrinon pri Esperanto kaj anoncis pri ĝi per la loka radioservo. La ekspozicio daŭris 7 tagojn.

La 20-an de aprilo 1959 ni malfer-

mis kurson por komencantoj kun 30 partoprenantoj, kiu bone funkcias. La kursanoj vizitas ĝin regule. La kurson gvidas s-ano Kolju Pančev.

Dufoje en la monato vendrede la estraro de la societo kunsidas en la klubejo de la Patrolanda fronto por diskutado de la societa laboro.

Ankaŭ dufoje en la monato, vendrede, en la sama klubejo la membroj de nia societo kunvenas por ekzerco je parolado en Esperanto.

Ivan Stojanov

Levskigrad. Okaze de la datreveno de la morto de Zamenhof, la 14-an de aprilo k. j. nia E-societo «Vasil Levski» organizis memorigan kunvenon. Prelegon pri Zamenhof faris s-no L. Gajdarov.

Je la 1-a de majo nia societo partoprenis en la solena popola manifestacio kaj tre bone prezentis sin.

Nun, okaze de la esperantista konferenco en vilaĝo Rozino la 31-an de majo ĉ. j. kiu koincidas kun la festo de la rozoj, nia societo intense preparas sian patroprenon okazontan en la ĉarma roza valo.

Cv. Cvetkov

Ruse. En la antaŭtagoj de la 1-a de majo la esperantistoj el la urbo organizis solenan unuamajan kunvenon kaj samtempe festis la 40-an datrevenon de la esperantistiĝo de sia aktiva kaj entuziasma s-ano Boris Kavalĝiev. Okaze de sia jubileo, k-do Kavalĝiev donacis al la E-societo en la urbo grandan, sursilke broditan societan standardon.

La esperantistoj el la urbo elkore salutis sian malnovan samideanon kaj bondeziris al li ankoraŭ 40 jarojn da vivo en bona sano por senlaca laboro por la prospero de la movado kaj modela ofica agado.

I. Dimitrov

Peŝtera. La 20-an de februaro 1959 okazis la ĵarkunveno de la loka Esperanto-societo «Nova Epoko».

Ĉeestis reprezentanto de CK de BEA Ivan Bataklijev.

En la raporto oni substrekiis kelkajn gravajn iniciatojn realigitajn dum la pasinta jaro.

Oni organizis du Esperanto-kursojn, unu propagandan vitrinon kun interesaj korespondaĵoj.

En la iniciato partoprenis la kamaradoj: Georgi Savov, Conka Popova, Savka Sugareva k. a.

Post la 33-a kongreso la societo aranĝis dutagan Esperanto-ekskursion, kun dekdu polaj gastoj-esperantistoj, kiuj venis en Peŝtera sub la gvido de samideano Jan Bartkieviĉ. La gastoj vizitis la diglagojn «Vasil «Kolarov» kaj «Batak», la tapiŝlaborejon, elektrouzinon en Batak kaj iujn pitoreskajn lokojn de Rodopimontaro. Dum la pasinta jaro dek membroj vizitis la spektaklon de la esperanta artista grupo ĉe BEA en Plovdiv. Ankaŭ dek gesamideanoj vizitis la 33-an kongreson en Varna. Sesdek procentoj el niaj membroj estas abonantoj de «Bulgara Esperantisto», multaj aliaj ricevas la revuojn «Paco», «Nuntempa Bulgario» k. a.

Nun preskaŭ ĉiuj korespondas kun gesamideanoj el diversaj landoj. Por plibonigi la laboron de la societoj la ĵarkunveno akceptis rezolucion pri la laboro dum la nova jaro.

Estis elektita nova estraro:

Prezidanto — Ŝterju Kukuŝev, sekretario — Georgi Savov, kasishtino — Bonka Popova, resp. pri kulturklerigaj aferoj — Savka Cugareva.

Irfan Ĉauŝev

Pleven. Dum la jubilea «Zamenhofa jaro» la esperantistoj el la urba societo «Esperanto» planas la organizadon de diversaj aranĝoj.

Jam komenciĝis la ciklo de radio-disaŭdigoj: «Ellernu kaj propagandu la internacian lingvon Esperanto». Dum la unua radiodissendo parolis la prezidanto de la societo. Li detale klarigis la esencon kaj signifon de la internacia lingvo Esperanto kaj la utilon de ĝia lernado kaj aplikado. La 15-an de aprilo okazis la dua radiodisaŭdigo. Oni sciigis al la urbanoj, pri antaŭstaranta solena vespero je honoro de L. L. Zamenhof. Parolis ankaŭ gekursanoj el la ĵus fininta sian laboron sesmonata E-kurso.

Niaj geurbanoj montris grandan intereson al nia laboro. Dank al tiu intereso, la solenan vesperon je la 16-a de aprilo ĉeestis pli ol 400 geesperantistoj kaj geurbanoj. Multe da gejunuloj jam ekdeziris lerni Esperanton en niaj aŭtunaj kursoj. Bona raporto pri la vivo kaj ago de D-ro L. L. Zamenhof kaj pri la kreita de li internacia lingvo Esperanto faris s-no Ljuben Dunĉev. Estis prezentita konvena filmo: «Kamaradaj renkontiĝoj» dediĉita al la V-a tutmonda junulara festivalo en Varsovio.

Laborante ĉiam pli obstine ni multnombriĝos kaj stabiligos nian societon por ke ĝi estiĝu unu el la plej grandaj kaj aktivaj societoj en la lando.

Julia Pupova

Kubrat. Antaŭ nelonge kara gasto en nia urbo estis s-no Georgi Dimov, lektoro en la Universitato en Varna kaj konata aktivulo de la Esperanto-movado en nia lando. Afable akceptita de la direktoro de la gimnazio — k-do Jordanov, la instruistoj kaj la lernantoj, nia gasto faris en la gimnazio tri prelegojn pri la utilo kaj signifo de Esperanto kiel taŭga ilo por paca laboro kaj internacia interkompreniĝo. K-do G. Dimov demonstraciis antaŭ la lernantoj ankaŭ la rektan metodon de Andreo Ĉe pri instruado de Esperanto.

Vespere, en la Esperanto-klubejo okazis renkonto de nia gasto kun la geesperantistoj el la urbo. K-do Dimov rakontis detale pri la agado de la geesperantistoj el Varna kaj pri sia vizito en Jugoslavio.

Rezulte el tiuj aranĝoj rimarkeble kreskis la intereso al Esperanto kaj multaj urbanoj kaj lernantoj ekdeziris lerni la internacian lingvon.

Hristo Dimitrov

MALLONGDAŬRA KURSO KUN GRANDA SUKCESO

Sofio. La 11-an de majo finis sukcesplene sian laboron la plej mallongdaŭra kurso por komencantoj. Nur post 11 lecionoj la gepartoprenantoj-studentoj el la sofiaj altlernejoj scipovas konversacii en Esperanto.

La kurso komenciĝis tute ordinare laŭ iniciato de la Junulara sekcio de BEA kun ĉirkaŭ 55 enskribiĝintoj. Sed kiom granda estis la surprizo de la gekursanoj kiam la lektoro — s-no Violin Oljanov, ek de la unua leciono

ekparolis kun ili nur en Esperanto. La instruado estis gvidata laŭ la rekta metodo de Andreo Ĉe.

La rezultoj de tiu unua kurso en Sofio, laŭ la rekta metodo estas ne atendite bonaj. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj finis la kurson kaj en mallonga tempo ellernis sufiĉe bone la fundamenton de la internacia lingvo.

Al la novebakitaj geesperantistoj kaj ilia lerta kursgvidanto ni bondeziras novajn sukcesojn.

S. Simeonov

LA UNUAMAJA MANIFESTACIO EN SOFIO

Inter la centmiloj da sofiaj unuamajaj manifestantoj ankaŭ ĉi jare estis videblaj la vicoj de la esperantistoj. Ĉefrunte kun la portreto de L. L. Zamenhof, verdaj kaj naciaj standardoj kaj konvenaj sloganoj marŝadis nia kelkcenta esperantista grupo.

Nia ĉi jara manifestacio havis sufiĉe bone organizitan fizionomion. La lastatempe organizita Esperanto-ĥoro konstante kantis bulgarajn kaj Esperanto-kantojn: «Kamarada kanto», «La Espero», Junularo, formu rondon!» «Vivu la verda stel» kaj aliajn kantojn. La zorgeme antaŭripetitaj sloganoj sonoris potence plene.

Dum nia grupo eniris en la ĉefan placon antaŭ la blankŝtona maŭzoleo de G. Dimitrov, la laŭtparoliloj anoncis pri nia apero. En la festa bruo de sloganoj, salutoj kaj muziko estis aŭdeblaj ankaŭ niaj esperantaj vortoj; estis videblaj la verdaj standardetoj alte flirtigataj super niaj kapoj.

Ne estis ia hazardo la varme amika rideto sur la vizaĝoj de la partiaj kaj la ŝtataj gvidantoj, starantaj sur la maŭzoleo. Ne unu inter ili, dum

siaj junaj jaroj, tra la faŝista persekutado, kaŝis en sia poŝo ankaŭ la Esperanto-lernolibron. Nun ili ĝojis vidi la vicojn de la esperantistoj ĉiam pli multnombraj, pli vivantaj kaj konstante batalantaj por paco kaj internacia interkompreniĝo.

Amike observadis la esperantistan manifestacion ankaŭ la multnombra cetera publiko. Vere la kantoj kaj la voĉoj de la esperantistoj trafe esprimas la sopirojn de nia tuta popolo: en daŭra internacia paco konstruadi sian feliĉan vivon.



Parto de la manifestintoj antaŭ la universitato

Membroj de la ĵus fondita Esperanta kino-klubo filme fotografis iujn interesajn momentojn el la manifestacio.

Stefan Kadiev

FREŜA EKBLOVO EN LA VERDA KARAVANO

Samokov. Dum la pasinta aŭtuno en nia urbo komencis sian ekziston du esperantaj kursoj. Unu estis malfermita en la juĝejo, kaj la alia estis urba kurso. La nombro de la enskribiĝintaj estis 50 homoj, sed poste ni restis malmulte. La restintaj faris unu komunan grupon. Kiel ĉiu komenco ankaŭ ĉe ni ĝi estis malfacila, sed al ni okazis tio, kio okazas al malthaltigita kluzo, kies akvoj, ŝprucintaj foje, plu ne estas haltigeblaj, kaj nun ni strebas ĉiam pli antaŭen kaj pli supren. La malfacilaĵoj ne timigis nin. Inspirataj de la penso, ke per studado de la internacia lingvo Esperanto ni kontribuos al la monda paco, al la disvastigo de la amikecaj ligoj inter ĉiuj homoj en la mondo, ni ne cedis eĉ paŝon malantaŭen antaŭ la malfacilaĵoj.

Ni kunvenas ĉiusemajne de 17.30 h. ĝis 20 horo. Nia kursgvidanto estas Vasil Trifonov — advokato. Li gvidas la kurson laŭ la lernolibro de Iv. Sarafov kaj Sim. Hesapĉiev. Post legado kaj traduko ni ekzercas nin en interparolado pri la tuta ellernita materialo. En la komenco la demandojn direktis al ni la kursgvidanto Trifonov, sed poste, kiam ni progresis, ni komencis kon-

versacii inter ni kun la helpo de la kursgvidanto. Tiu maniero plaĉis al ni multe, ĉar ĉiu strebis direkti pli malfacilajn demandojn al sia kunparolanto kaj ni preparis nin pli solide; kaj ĉar restis pli malmulte da homoj, estis tempo por interparolado de ĉiuj.

Post kiam ni finis la kurson ni fariĝis membroj de la esperantista societo «Rila esperantisto» — Samokov, kiu nombras 30 membrojn.

Ni nun kunvenas kune kun la malnovaj kaj novaj esperantistoj, inter kiuj kreiĝis amikeco, naskita de la komuna celo. Nun ni legas, tradukas rakontas esperantajn rakontojn aŭ novelojn. En la kurso estas tre agreable. Ni ĉiuj estas kontentaj pri la maniero, per kiu ni laboras. Iuj el ni korespondas kun geesperantistoj en nia lando kaj alilande.

Ni ricevis la kubratan bultenon «Progreso», kiu plaĉis al ni.

Tiel ni laboras. Nia deziro estas ke per Esperanto ni partoprenu en la firmigo de la tutmonda paco, por ke ĉiuj homoj en la mondo fariĝu fratoj; ne estu plu milito, morto kaj malĝoj!

Stanka Ĉukolova

ESPERANTO-GRUPO EN SUPERA MEDICININSTITUTO-PLOVDIV

La 14-an de marto en la supera medicina instituto «I. P. Pavlov» — Plovdiv, kunvenis 12 gesamideanoj laborantaj en la sama instituto kaj fondis esperantistan grupon. Kiel prezidanto de la grupo estas elektita nia malnova s-no profesoro Galabov, sekretario — D-ro N. Donev.

La grupo starigis antaŭ si la taskojn: propagandi kaj disvastigi la lingvon inter medicinaj laboristoj

kaj studentoj en la instituto, utiligi la lingvon por praktikaj celoj en sia scienca laboro, kreante ligojn kaj korespondante pri medicinaj demandoj kun siaj kolegoj kaj institutoj en aliaj landoj.

I. Bataklijev

La redakcio varme salutas la novefonditan grupon kaj deziras plenan sukceson al ĝia esperanta agado.

Razgrad. Kun la helpo de la esperantistoj el Kubrat kaj vilaĝo Isperiĥ la 10-an de aprilo en la nova distrikta urbo Razgrad estis fondita E-societo. Okaze de la jubilea Zamenhofa jaro la fondintoj decidis nomi sian novan societon: «D-ro L. L. Zamenhov».

Estraron de la societo konsistigis la jenaj gekamaradoj: prezidanto-P. Colov, sekretario-St. Palazov, kasis-tino — R. Dimova kaj resp. pri kulturklerigaj aferoj — Aĥmed Karĝaliev. La nova societo tuj post sia fondiĝo aktive eklaboris. Ĝi havas komunan klubejon kun la loka komitato pri Bulgara-soveta amikeco. Sub la gvidado de H. Kasimov komenciĝis la unua kurso por komencancantoj kun 20 gepartoprenantoj. Baldaŭ estos malfermita kurso en la penicilina fabriko, kie multaj laboristoj kaj oficistoj deziras lerni la internacian lingvon.

La jam organizitaj esperantistoj el la urbo kun Zamenhofa flamo la-

boras por la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto — lingvo de la amikeco inter la popoloj.

J. Dimitrov



Esperanto-vitrino de s-to «M. Gorkij» sur placo «Slavejkov», Sofio

JUNULARO SUR POSTENO

NI KREU FAVORAJN CIRKONSTANCOJN POR LA JUNULOJ

En niaj esperantistaj kunvenoj en Asenovgrad mi havis la eblecon observi la ĉeeston de la vizitantoj dum multaj jaroj. Kaj la konsisto tre malrapide ŝanĝiĝas. Preskaŭ la samaj geeseprantistoj konataj de la pasinteco. Malofte ni sukcesas aligi kontentigan kvanton da finintoj de la ĉiujaraj kursoj al niaj vicoj kaj pli speciale gejunulojn. Tiu ĉi konkludo certe validas pli aŭ malpli ankaŭ por aliaj Esperanto-societoj en nia lando.

Kaŭzo pri tio estas, ke ni unue flamis la korojn de la novuloj, paro-

lante al ili pri la facileco de la lingvo, pri ĝia pacama ideo ktp. Sed poste ni ne sukcesas krei pli favorajn ĉirkonstancojn al ili. Ni forgesas, ke ili estas junuloj, ke ilin interesas ankaŭ aliaj aferoj. Necese estas, ke dum la kurso kaj post ĝia fino oni okazigu renkontiĝojn, amuzvesperojn, letervesperojn, ekskursojn.

Tasko de nia junularo kaj speciale de niaj junaj aktivuloj estas direkti pli grandan atenton al la ekskursoj. Neniam dum mia vivo mi forgesos la amasajn ekskursojn, kiujn ni organizis dum la jaroj 1931-1934 kaj pos-

te en la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Asenovgrad kaj aliloke. Ĉeestis geesperantistoj el Plovdiv, Asenovgrad, Krŝim, Kuklen kaj aliaj loĝlokoj en la distrikto.

La ekskursojn vizitadis la junularo amase, tamen inter ili ne mankis ankaŭ aĝuloj, kiuj sur la tuta vojo babiladis en Esperanto kaj faris fortan impreson al ni — la junuloj. Tiumaniere ankaŭ ni la novuloj kuraĝiĝis diri ion en Esperanto. La ekskursoj pasadis en Esperanto-deklamaĵoj, kantoj, ŝercoj, dancoj, komunaj fotoj kaj en tre amuza kaj agrabla samideana atmosfero.

Pro la vekita entuziasmo, senpacience ni atendis la sekvantan dimanĉon aŭ festotagon por iri aliloke.

Sed ĉi-foje ni penis pretigi nin pli bone. Ni legis pli, lernis novajn Esperanto-kantojn, deklamaĵojn, kolektis novericevitajn interesajn leterojn aŭ ilustritajn poŝtkartojn el fremdlando, por ke en la venonta ekskurso ni prezentu nin pli dece. Vere, ke iam al ni okazis ankaŭ malagrablaĵoj fare de la policistoj, sed nun tio ne estas nia temo.

La plimulto de la esperantistoj en Asenovgrad estas bakitaj dum tiu ĉi periodo. Kaj jen kial ŝajnas al mi, tempo jam estas, ke ni ekagu pli amase al tiu ĉi direkto dum la kuranta sezono. Ĉar nur tiumaniere kreante favorajn cirkonstancojn por la junuloj, ni povus aligi ilin al niaj vicoj.

At. Gaev

LA GELERNANTOJ VIGLAS

Vil. Polski Trambes — distrikto de Tarnovo. La Esperanto-kursoj marŝas sukcese. En la komenco de majo en la vilaĝo okazis loka festivalo. Konekse kun ĝi ni aranĝis ekspozicion en la kulturdomo kun esperantaj materialoj.

En la unuamaja manifestacio la gelernantoj-esperantistoj partoprenis plej aktive, vestitaj en blankaj ĉemizoj kun steloj surbruste. Ili portis grandan Esperanto-standardon, portreton de Zamenhof, sloganon «Esperanto-paco-socialismo.» Mi gratulis la esperantistan grupon en Esperanto per: «Saluton, junaj esperantistoj» kaj ili respondis: «Saluton, kamarado direktoro». Ĉio ĉi faris grandan impreson al la publiko.

La esperanta 10-klaso progresas ankaŭ en la sporta kampo. En batalo inter la 14 gimnaziaj teamoj de basketbalo, la knaboj metis specialajn

steletojn sur la flaneloj kaj deklaris, ke ili batalos ĝis siaj lastaj fortoj por «la venko de Esperanto». Kaj ili gajnis. Dum la konkurludoj oni parolis ne pri X-a klaso, sed pri la esperantistoj kaj pri ilia ludo. Kaj en la klaso nun flirtas du standardetoj — la esperanta kaj pri la unuarangeco en la basketbalo. Eĉ io pli, la teamo de IX-a klaso, kiu ankaŭ lernas Esperanton, estas gimnazia avangardulo de basketbalo pri junulinaj. Do, ni ĉie kaj ĉiam venkas.

Antaŭ dek tagoj ni vizitis la geesperantistojn en urbo Bjala. Tie ni aranĝis malgrandan feston: plenumis programon en Esperanto kaj en bulgara lingvo en unu klubejo de la centra placo, kun mallonga prelego pri la signifo de Esperanto en la batalo por paco. La tieaj lernantoj ankaŭ plenumis kelkajn programecojn; ili aranĝis ekspozicion de esperantaj materialoj. La direktoro pro-

mesis, ke dum la estonta jaro oni donos «verdan straton» al Esperanto en la lernejo.

Ni intencas fini la lernojaron per specialaj ekzamenoj kaj disdoni diplomojn al la sukcesintoj. Ni esperas, ke la estraro de BEA helpos nin ĉi rilate.

Hr. Manolov

NOVA JUNULARA GRUPO

Tolbuĥin. Estas fondita Junulara Esperanto-grupo ĉe la urba E-societo «Paco». Oni elektis por estraro de la grupo la gekamaradojn K. Kalĉevski, I. Koleva, St. Zagorova, P. Vasileva k. a.

Al la junaj geesperantistoj el Tolbuĥin ni bondeziras sukcesplenan poresperantan laboron.

KONFERENCO DE LA JUNAJ GE- ESPERANTISTOJ


La 2-an de majo laŭ iniciato de la Junulara E-grupo ĉe la E-societo «Libero» en Ruse okazis la unua konferenco de la esperantistoj-komsomolanoj el la distriktoj de Ruse, Razgrad kaj Silistra. Raporton pri la agado de la Junulara E-grupo en Ruse faris la prezidanto de la grupo Ĥr. Ĥristov. Pri sia sperto kaj varia agado raportis ankaŭ la junuloj el Bjala, vilaĝo Batiŝnica kaj iuj mezlernejoj en Ruse.

La konferencon salutis varme reprezentanto de la Distrikta kaj la Urba komitatoj de la Komsomolo en Ruse. Oni aprobis rezolucion, devigantan la junajn geesperantistojn organizi sin en E-grupoj ĉe la lokaj E-societoj kaj aktive labori por disvastigo de la internacia lingvo sub la devizo: «Per Esperanto por paco kaj amikeco inter la gejunuloj de la tuta mondo».

Oni decidis, ke ĉiu juna esperantisto abonigu almenaŭ unu sian eks-terlandan amikon al la eldonataj en nia lando E-revuoj. La gejunuloj decidis ankaŭ iniciati la nomigon de stratoj kaj placoj je la nomo de D-ro L. L. Zamenhof aŭ Esperanto okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de nia Majstro.

En la fino la ĉeestantoj elektis interdistriktan kontaktan komitaton, kiu zorgu pri la komunaj aranĝoj de la gejunuloj de la tri distriktoj. Oni aprobis saluttelegramojn al la CK de la Komsomolo kaj al la Junulara sekcio de BEA.

I. Dimitrov



La 2-an de junio la bulgara popolo honoris la pereintojn en la batalo por libero kaj demokratio. La foto prezentas la fratecan tombon en Sofio.

ORGANINA KONKURSO

CK de BEA, plenumante la decidojn de la dua plenkunsido kaj speciale la punkton 8 de la Rezolucio pri la organizaj taskoj de BEA, aranĝas konkurson inter la societoj por plimultigo de la membraro kaj de la abonantoj al «Bulgara esperantisto».

La kondiĉoj de la konkurso estas la jenaj.

1. Kiel bazon por plimultigo de la membraro ni akceptas la kontrolajn ciferojn, publikigitajn en N-ro 5 de BE.

2. Kiel bazon por plimultigo de la abonantoj ni akceptas la 70-procentan parton de la kontrola cifero por membroj. Ekz., se la kontrola cifero por membroj estas 120; la kontrola cifero por abonantoj estas 84 (70%).

3. La kalkulo de la rezultoj estas bazita sur procenta plenumo de la kontrolaj ciferoj. Estas konsiderata la meza procento por membroj kaj por abonantoj.

Ekzemplo:

1. Societo «D. Sasonov» en Asenovgrad havas kontrolajn ciferojn: pri membroj 72, pri abonantoj — 50. Ĝi pagis al la asocio la membrotizon por 59 personoj (85%) kaj la abonon por 45 personoj (90%). Rezulte la societo havas mezan plenumon de 87.5%.

4. La rezultoj estos kalkulataj po trimonatoj. Ili estos presataj en la septembra, la novembra kaj la januara n-roj de «Bulgara esperantisto».

5. Estos publikigataj nur tiuj societoj, kiuj havas plenumon almenaŭ de 80%. Estos publikigataj en aparta kolono ankaŭ la 5 lastaj en la konkurstabelo societoj.

6. La fina limtempo de la konkurso estas 15-a de decembro 1959.

7. Tri premioj: unua — flago de CK de BEA kaj biblioteko por 300 levoj; dua — biblioteko por 250 levoj; tria — biblioteko por 200 levoj.

Esperantistoj pereintaj por la libero

STOJAN EDREV

Stojan Edrev naskiĝis la 12-an de septembro 1919 en vil. Radjovene (nun Stojanovo), reg. de Loveĉ, en la familio de malriĉaj gepatroj. Post fino de progimnazio li estis devigita lerni la kudristan metion por gajni sian orfan panon. Iom poste li fariĝis lernanto en la pedagogia gimnazio de urbo Loveĉ. Li partoprenis marksismo-leninismajn rondetojn, staris frunte de «Remsa organizaĵo (Labo-

rista junulara asocio) kaj estis unu el la gvidantoj entuziasmaj de la lernantaj strikoj en 1934 j. Pro tio li estis ekskludita kaj en 1935 finis la gimnazion en Orjahovo. Li revis fariĝi instruisto kaj eduki la junularon en komunismo kaj pro tio enmatrikuligis studento de pedagogio en la universitato en Sofio. Li ege suferis pro sia malriĉeco, sed venkis ĉiujn malfacilaĵojn.

Kiel studento li estis membro de unu el la estraroj de la Bulgara ĝenerala popola studenta asocio (BONSS), partopreninto en anti-faŝistaj agoj, protestoj, mitingoj, eksterleĝaj kunvenoj kaj konferencoj. Ĉio ĉi helpis al li hardiĝi kaj eduki sin kiel fidelan filon de la popolo.

La komunista partio bone pritaksis lian laboron kaj en 1936 li estis akceptita kiel ĝia membro. Tio lin tre-ege ĝojigis kaj lia entuziasmo estis senfina.

Li finis la universitaton kaj elkore ĝojis, ke povos fariĝi instruisto. Sed ne estis facila afero por tiu ardanta kaj malhumila pedagogo fariĝi instruisto. Malgraŭ ke li havis universitatan diplomon por li ne estis trovebla instruista loko. Finfine en 1941-42 oni oficigis lin en la «novaj» landrandoj en vilaĝo Novo Hoĝevo, regiono de Sandanski (nuna Greklando).

La juna instruisto ekamis la homojn kaj sian laboron en la lernejo. Sed ĝuste tiam plifortiĝis la tutpopola batalo kontraŭ la faŝismo. Stojan Edrev rapidis kontakti kun la partizanoj de taĉmento «Jane Sandanski». Tio helpis al li serioze sin prepari, precipe en pafado, por la kruda partizana vivo, kiu por li fariĝis neevitebla. Malkaŝita de la polico, li forlasis la vilaĝon Novo Hoĝevo kaj dum la somero de 1942 j. li ekiris la krutan partizanan vojon, kiu alkondukis lin ĝis la supro de legenda heroo, precipe en la departemento de Pleven. Post la batalo sur «Kitkata», kie li kune kun Valko Todorov venkis multnombrajn policistojn kaj sol-

datojn el Loveĉ — lia heroaĵo kaj lia nomo famiĝis en la tuta lando.

Por la Partio kaj por la libero Stojan Edrev donis ĉion — fine ankaŭ sian vivon. La jaroj de la heroo partizana batalo estas la plej helaj paĝoj de lia vivo. Kiel ĉefo de la stabo de XI militoperacia regiono li gajnis la ardan amon de la popolaj partizanoj, kiuj iris al batalo kun plena kredo je la sukceso de ĉiu akcio. Kaj lia nomo flugis kiel legendo. Homo kun vigla kaj moviĝema intelekto, kun fera kaj senŝanceliĝa volo, li forbrulis en la batalo por la libero de sia popolo.



Kun multaj heroaj epizodoj estas plena la vivo de la heroo-partizano ĝis lia lasta tago. Stojan Edrev amis ege la vivon kaj kredis je la proksima venko de la popolo. Sed en unu tempesta kaj pluva frua mateno la 19-an de junio 1944 j. li pereis en la gvidata de li akcio en vil. Beglej, reg. de Pleven, pereis

li, la fama heroo-partizano kolonelo Stojan Edrev. Li pereis por la libero kaj la sendependeco.

Li ĉiam emfazis antaŭ mi (Dolĉin D. Stojkov), ke kiam la laboristoj kaj la vilaĝanoj de la tuta mondo prenos la aŭtoritaton en siaj manoj, ili bezonos komunan lingvon, en kiu ili interparolos. Tia lingvo estis Esperanto, tre facila kaj lerninda de ĉiu ordinara homo. Pri ĝi ni estis aŭdintaj, sed ĝin ni ne konis. Iun tagon dum aŭgusto 1933 Stojan venis kaj vokis min, ke ni iru en la hejmon de Geto Dobrev el nia vilaĝo, nun instruisto en urbo Ruse. Li scipovis Esperanton. Ni komencis lerni la lingvon laŭ la lernolibro de At. D. Ata-

nasov. Pli malfrue ni havigis al ni ankaŭ la lernolibron de Zah. Zahariev. La lingvon ni lernis memstare kaj ĉiusemajne ni kunvenis en iu hejmo por klarigi al ni iujn lingvajn malfacilaĵojn. Post iom da tempo ni komencis paroli en Esperanto. Plej obstine lernis Stojan kaj plej multe progresis. Dum unu el la ferioj li venis ĉe min kun multaj adresoj de fremdlandanoj, kiuj deziris korespondadi. Baldaŭ Stojan ricevis respondon el Svedlando. En ĝi oni preskribis la mizeran staton de la laboristoj en unu vitraĵfabriko, inter kiuj estis ankaŭ esperantistoj. Tiu ĉi letero impulsigis Stojan kaj li ankoraŭ pli diligente komencis lerni la ling-

von. Li kreis al si grandajn ligojn kun esperantistoj el fremdlando. Obstine lernis la lingvon ankaŭ Nato Canov Valĉev kaj Marin Kolev Kunĉovski, la unua instruisto en vil. Mugla, reg. de Devin, la dua — laĉsandalisto en Radjovene.

Ambaŭ proksimaj kamaradoj de Stojan Edrev estis mortpafitaj kiel helpantoj de la partizanoj la 16-an de novembro 1943 j. en vil. Stojanovo.

La esperantistoj konservos karan memoron pri tiu idealisma triopo, kiu oferis sian vivon por la feliĉo de la popolo, por triumfo de siaj homamaj ideoj.

Marin Jonov, Dojĉin Stojkov

RUĜA PAPAVO

Harmoniigo: Panĉo Vladigerov

Malrapide melodie

1. Ruĝ-pa-pa-vo i e so-le dis-flo-ris

en gren-kam-po o-ra kaj ruĝ-ri-glar-don sen-dvas

mo-le al pe-za spik', al pe-za spik' kun mil-da

sent'. 2. Mal-ĝoj-aj de la jun-prin-temp'

Ruĝpapavo ie sole
disfloris
en grenkampo ora
kaj ruĝrigardon sendas mole
al peza spik',
al peza spik',
kun milda sent'.

Malĝojaj pensoj ĝin agitas:
«Mi floras,
sed ĉu rememoros
min morgaŭ iu? — Forgesita
forvelkos mi
sen simpati'
sub firmament'.»

Sed kiam vento ekblovetas,
mi aŭdas —
triste kaj mallaŭte —
floretoj ruĝaj susuretas,
flustretas do,
flustretas nun
en la silent':

«El viaj semoj ĝermos alte,
disfloros
ruĝaj, etaj floroj
kaj via bel' ornamos baldaŭ
la kronon de l',
la kronon de
la jun-printemp'.»

Tradukis: Stefan Kiraĝiev

EN LA PATRIO DE ESPERANTO

Dum 1958 mi ricevis invitojn de polaj samideanoj resti en ilia lando pli longe kaj helpi ilin en la preparaj laboroj por la 44-a jubilea universala kongreso, gvidante kursojn de Esperanto kaj prelegante.

Mia alveno koincidis kun la XV kongreso de la polaj esperantistoj en Krakov, kie mi estis reprezentanto de Bulgara esperantista asocio.

Je la 22-a de septembro mi jam estis en Nowy Sacz. Baldaŭ post tio ni komencis la prelegojn en la mezlernejoj. S-no Hoda-kowski estas bone konata en tiu kaj en la ĉirkaŭaj lokoj, li antaŭe preparolis kaj pre-
paris la grundon. La temo de la prelegoj es-
tis geografi-turisma pri la lando de la rozoj
kaj de Georgi Dimitrov. La aŭskultantoj aŭ-
dis belan esperantan parolon kaj bonan po-
lan tradukon. Dum la aŭskultado ili spertis,
ke ili komprenas multon de la Esperanto-
parolo. Tio estis tre grava elemento en nia
laboro — montri la lingvon mem, ĝian uza-
don. De prelego al prelego ni plibonigadis
nian laboron: aŭ mi kun traduko de s-no
Hodakowski, aŭ li en pola lingvo klarigadis
al la aŭskultantoj la signifon, la valoron, la
aplikon de la internacia lingvo. En iuj el la
lastaj prelegoj mi faris provleciojn kun la
aŭskultantoj: ili ekparolis en Esperanto, kiun
ili jam aŭskultis dum unu horo (kun tradu-
ko).

Tiel ni faris prelegojn en kelkaj mezler-
nejoj en Nowy Sacz, en Limanowa, Stary
Sacz kaj Gorlice. En la lasta urbo, konata
de la unua mondmilito, tradukis la prelegon
s-ano Andrej Kler.

Unu post alia ni komencis ankaŭ la kur-
sojn: en Nowy Sacz ĉe la pedagogia lernejo,
ĉe la aŭtomobila lernejo, poŝta lernejo; en
liceo «Długosz» kaj suface malfrue en la eko-
nomia mezlernejo; en Stary Sacz mi havis
unu kurson ĉe la pedagogia lernejo; en Li-
manowi mi komencis du kursojn — unu por
gelernantoj, alian por civitanoj. Poste ni de-
vis unuigi ilin.

Por la sukceso de la kursoj estis tre gra-
vaj la lokaj organizantoj. Kun danko kaj
admiro mi devas mencii la nomon de la tre
aktiva kaj sindona s-ano Jerzy Janowski kaj
lia helpanto Marian Szumilas en Limanowa.
Same tre aktiva estis s-no Kazimierz Sliwa
en Gorlice, kaj s-ano prof. Grela ĉe la poŝta
lernejo en Nowy Sacz.

Mia metodo estis precipe rekta. Tio ne
estas ĝuste la metodo de Andreo Ĉe. Mi eĉ
ne povis imagi, ke ĉe diversaj cirkonstancoj
la instruado laŭ rekta metodo povas havi la
saman enhavon, la saman vortaron. Tiurilate
inter miaj kursoj ekzistis diferencoj. La
kursanoj havis la lernolibron de prof. Syg-
narski kaj mi sekvis la ordon de la materia-
lo. Iujn klarigojn mi donadis en pola lingvo
en kiu mi iom post iom progresis. En iuj

kursoj mi donis al la kursanoj vortaretojn kun listoj de la afiksoj kaj ĉirkaŭ la fino miksis la rektan metodon kun la gramatika. Ĉe Esperanto tio estas tre konvena. La kursanoj ĉiam devis paroli kaj uzante la konatajn vortojn devis senfine kombini por formi diversajn frazojn.

Preskaŭ ĉe ĉiu leciono mi montris aŭ legis iun leteron el eksterlando, iun esperantaĵon kaj tiamaniere jam en la komenco ligis la kursanojn kun la enlanda kaj internacia esperantista movado. Tre frue la kursanoj komencis korespondi kaj la ricevitaĵoj respondoj kuraĝigis ilin. En iuj kursoj apartaj kursanoj skribis la stereotipan leteron al eksterlando post la unua leciono. Ĉe la unuaj respondoj al leteroj iuj kursanoj prenis la vortojn el la vortaro mekanike, sed iufoje mi estis agrable surprizita de bone skribitaj memstaraj respondoj kun malmultaj eraroj (ekz. en Stary Sacz).

Je la 2-a de januaro 1959 mi forveturis al Cieszyn, kie atendis min multa laboro en kvar loĝlokoj. Survoje mi prelegis en Bochnia pri la esperantista movado en Bulgario. La prelego estis ne nur por esperantistoj. Duan fojon mi prelegas en tiu urbeto kaj mi amikiĝis kun tiu agrabla publiko.

En Cieszyn, Bielsko-Biala, Golezow kaj Ustron mi faris bone organizitajn prelegojn kaj komencis kelkajn kursojn. Iuj kursanoj skribis leterojn jam ĉe la unua leciono.

En Krakow mi faris prelegon pri la esperantista movado en Bulgario (okaze de la organizita «Monato de Bulgario»).

En Sosnowiec s-ano Wolczyk organizis ok prelegojn en kvar tagoj. Li ricevis permeson de la kuratoro organizi miajn prelegojn en la tuta Katowica vojevodio, kies loĝantaro eble estas miliono kaj diono.

De Cieszyn mi skribis leterojn al ĉiuj miaj kursoj kaj ricevis respondojn de iuj el ili. Tio ĝojigas min: mi vidis, ke mia laboro en kursoj donis rezultojn. Mi kredas, ke inter la junaj kursanoj iuj multe progresos kaj okupos gravan lokon en la pola Esperantomovado. Mi kredas, ke kun iuj el miaj kursanoj mi intervidiĝos dum la 44-a universala kongreso en Varsovio aŭ en alia tempo kaj en aliaj lokoj (ankaŭ en Bulgario).

La interŝanĝo de prelegantoj kaj kursgvidantoj estas bonega rimedo por konigi nian lingvon kaj movadon al la vasta publiko. Tia interŝanĝo devas organizi la centrajn organizaĵojn.

Rememorante la streĉan laboron en Pollando, vidante la rezultojn de ĝi, mi kun danko rememoras la ofereman kaj obstinan laboron de miaj kursanoj kaj de la viglaj organizantoj.

Ĝis revido, karaj polaj geamikoj, dum la 44-a universala kongreso en via bela ĉefurbo!

Simeon Hesapčiev,
membro de Bulgara Esperanto-
instituto

EN LA DISPUTO NASKIĜAS LA VERO

Pri skribado de diversnaciaj nomoj

Legante esperantajn presajojn, ni ofte renkontas en tekstoj diversnaciajn nomojn, skribitajn laŭ sia nacia ortografio.

Ne por ĉiu esperantisto estas korekte legeblaj la nomoj. Ja la plimulto de la esperantistoj posedas nur sian gepatran lingvon aŭ unu-du plej disvastigitajn eŭropajn lingvojn. Sed la landoj, en kiuj oni uzas latinan alfabeton, estas tre multaj, kaj en ĉiu lando estas nacia ortografia specifo por skribesprimo de parolsonoj.

Por ekzemplo sufiĉas la vico da jenaj diversnaciaj familinomoj:

1. angla — SHAKESPEARE
2. finna — SETÄLÄ
3. francaj — ROUSSEAU, BEAUMARCHAIS
4. germanaj — THALMANN, PIECK
5. hungaraj — SZILAGYI, KALOCSAY
6. indonezia — KHE KHWAT LIAT
7. kamboĝa — LE-THI-TO-QUYEN
8. polaj — MICKIEWICZ, ORZESZKO

Ĉu estas eble por gelegantoj korekte elparoli ilin? Nature ne estas eble.

Por klareco ni faru la sekvantan komparon:

pola familnomo:

MICKIEWICZ

germana familnomo:

PIECK

1. La CK — kombinaĵo estas pole elparolata simile al esperanta elparolo germane elparolata kiel KK

2. La IE — kombinaĵo estas

pole elparolata simile al JE

germane elparolata kiel I — longa.

En germana lingvo Ĥ oni legas E (THÄLMANN-Telman), en finna — kiel JA (Setälä — Setjala). La nomo George germano legas simile al esperanta elparolado, sed franco legas JORĴ kaj anglo — ĜORĜ, SZ — kombinaĵo en pola lingvo respondas al esperanta Ŝ, en hungara — al esperanta S ktp.

Tial mi opinias, ke estas necese, ke oni skribu unufoje, ĉiun renkontatan unuan fojon en esperanta teksto nacia nomon dulingve — esperante kaj nacilingve, ekzemple Ŝekspir (Shakespeare) Telman (Thälmann) ka. La ordinara skribado devas esti esperanta, laŭ la fonetika principo!

Renkontataj en esperantaj presaĵoj geografiaj nomoj kaj nomoj de organizaĵoj bezonas ankaŭ sian esperantan skribmanieron. En esperantaj tekstoj ne devas esti nelegeblaĵoj.

Inĝ. Azaraj Pere'man,
Barnaul, USSR

TRA LA GAZETARO

En la ĵurnalo «Kooperativen podem», organo de la Partia komitato, de la administra konsilantaro de la Unuigita laborkooperativa agrarmastrumo «V. I. Lenin», de la popola konsilantaro, de la Patrolanda fronto kaj de la Dimitrova komunista junulara asocio en vil. Polski Trambeŝ, distrikto de Tarnovo, en la numero de 1-a de majo 1959 aperis multaj materialoj, dediĉitaj al Esperanto. Oni publikigis kelkajn gratuleterojn el fremdlando okaze de la unua de majo. Interesa estas la letero de la redakcio de ĵurnalo «Červen minjor» el Krivoj rog, subskribita por la esperantista grupo ĉe la redakcio de Rejtmen kaj Gonĉar. Ili skribas, ke la laborhomoj de Krivoj rog, kiel la tuta soveta popolo, demonstracios je la unua de majo siajn grandajn sukcesojn. Ĉiuj laborhomoj de la urbo estas fieraj kaj feliĉaj, ke per la eksporto de maŝinoj el USSR ankaŭ ili helpas por la industriigo kaj progreso en la aliaj landoj.

Henri Mok el urbo Nansi, Francio, skribas, ke malgraŭ ĉio, malgraŭ la teroro kaj la malpermeso la laboristoj en Francio demonstracios je la unua de majo kaj sendas

korsalutojn al la komunistoj en Polski Trambeŝ de la laboristoj en ilia uzino.

Nguen Din Hiu el urbo Hanoi, Vietnamio, sendas malproksiman fratan saluton al la konstruantoj de la suna socialismo en nia lando.

Tjolgesi Laslo, pedagogo el Urbo Gör, ankaŭ sendas salutojn kaj bondezirojn por feliĉo, sano kaj multaj sukcesoj en la konstruado de la socialismo kaj esprimas sian elkoran kaj eternan dankemon pri la helpo, ricevita de li de la samideanoj en la vilaĝo post la kontraŭrevolucio en Hungario en 1956.

Jen ankoraŭ alia konvinkiga laboro kaj pruvo por sukcesplena internacia korespondado. La samideanoj el urboj kaj vilaĝoj povas kaj devas labori sammaniere.

En ĵurnalo «Borba», organo de la distrikta komitato de la Bulgara komunista partio, de la distrikta popola konsilantaro kaj de la distrikta komitato de la Patrolanda fronto en Tarnovo, en la numero de 28-a de februaro 1959 aperis artikolo kun titolo «Ĉe la esperantistoj en Tarnovo» de Nikola Najde-

nov. La artikolo estas tre interesa kaj ni opinias ke multaj samideanoj povas labori kiel laboras niaj amikoj en la malnova bulgara ĉefurbo kaj lulilo de nia movado — Tarnovo. Do, ni rekomendas al niaj samideanoj labori kaj agi prudente kaj kuraĝe en ĉiuj lokoj de la lando ne nur dum la jubilea Zamenhofa jaro, sed ĉiam, neniam laciĝante, ĉiam firme kredante en la triumfo de nia movado.

La aŭtoro de la artikolo N. Najdenov rakontas interese pri la kurso por komencantoj, kie lernas la lingvon internacian dommastrino, kudristino, oficistino, kuracisto, oficiro, advokato, ĉarpentisto. Ili ĉiuj lernis nun la lingvon kaj dum la estonta jaro ili vizitos la kurson por progresintoj.

En la kurso la horoj pasas agrable kaj nerimarkeble. Toŝko ricevis leteron de Pollando. Kia ĝojo! Vi povas interkompreniĝi kun homoj, kiujn vi neniam vidis! Nedka montras fotografiaĵojn de Danlando. Penka legas leteron de «sia» hispano, kiu multe interesiĝas pri nia «komunista» lando. Borislav, majstro en fabriko «V. Mavrikov», rakontas pri sia kolego de silka teksejo en Italio, kun kiu li ŝanĝos specimenojn de ŝtofoj kaj faros «interŝanĝon de sperto». Ŝju Ŝan-ŝu el Ĉinlando interesiĝas pri nia sindikata movado, pri la laboro, pri la salajroj, pri la ripozoj, pri la plenumo de la normoj. Oni detale respondos al li. Pri la ripozdomoj oni sendos al li grandan interesan albumon. Harrold Thoms el Londono, kiu estas 73-jara, skribas ke de septembro 1957, kiam li estis en Bulgario, komenciĝas lia dua vivo. Li treege bedaŭras, ke dum 1958 ne povis gastigi al ni, sed dum 1959 nur la morto malhelpos lin alflugi ĉe nin.

Oni ne scias kiamaniere korespondi kun alilandaj esperantistoj. Jen modelo de internacia korespondado, kaj laŭ ni ĝi estas tre abunda, tre interesa, imitinda. La kursanoj en Tarnovo korespondas ankaŭ kun amikoj en Filipino, Rodezio, Kamboĝo, Aŭstralio, Kameruno, Senegalo ka. Tiamaniere ili senbrue laboras por la paco, gajnas amikojn por nia lando, disvastigas la sukcesojn de niaj laboristoj kaj vilaĝanoj. Agu kiel ili!

Jurnalo «Naroden drugar», organo de la distrikta komitato de Bulgara komunista partio kaj de la Patrolanda fronto en urbo Jambol en sia numero de 9-a de majo 1959 publikigas artikolon de s-no A. Blagoev — prezidanto de E-societo en la sama urbo, titolitan «Doktoro L. L. Zamenhof — kreinto de Esperanto». En la artikolo la aŭtoro donas koncizajn notojn pri Zamenhof kaj karakterizas la internacian lingvon, informante pri la nuna stato de la movado en nia lando kaj ekstere.

ESPERANTO DUM LA VII MONDA JUNULARFESTIVALO

Kiel dum la V-a kaj VI-a festivaloj, ankaŭ dum la VII-a Monda junular-festivalo en Vieno, okazos esperantista junulara renkonto. Multaj gejunuloj el diversaj landoj jam anoncas pri sia partopreno. La renkonto okazos la 28-an de julio 1959 en la nova kaj moderna salonego Stadthalle.

Laŭ la jam anoncita provizora programo de la renkonto, oni antaŭvidas: solenan inaŭguron, literaturan kaj distran programon, salutojn de la landaj reprezentantoj, diskutadon pri la temo «Loko kaj taskoj de la esperantista junularo en la batalo por paco kaj internacia interkompreno».

Dum la sekvontaj tagoj la partoprenantoj en la renkonto havos la okazon konatiĝi kun diversaj vidindaĵoj en la aŭstria ĉefurbo (palaco Schönbrunn, la teknika muzeo, Hofburg kaj la Internacia Esperanto-muzeo ktp). Oni antaŭvidas ankaŭ komunajn vizitojn de diversaj naciaj delegacioj.

La junaj esperantistoj en nia lando aktive partoprenas en la preparo de la dumfestivala E-renkonto. Jam estas eldonitaj tri numeroj de la speciala bulteno «Esperanto en la festivalo» kaj ĝis la festivalo aperos ankoraŭ unu. Antaŭ nelonge, sur unu el la ĉefaj placoj de Sofio estis aranĝita propaganda vitrino (vidu foton sur pĝ. 7) respegulanta pere de diversaj materialoj la ĝisnunan aplikon de Esperanto en la Mondaj junular-festivaloj kaj ĝian utilon por tiaj speciaj internaciaj aranĝoj.

Niaj reprezentantoj en la Festivalo faros ankaŭ la ĉefan prelegon dum la renkonto kaj portos donacojn de la bulgaraj gejunuloj por la alilandaj festivalanoj.

Iuj korespondantoj de BE sendas materiaĵojn en bulgara lingvo. Tio ege malfaciligas la laboron de la redakcio, ĉar ja ni ne havas salajratajn tradukistojn kaj redaktorojn. Pro tio ni petas la samideanojn sendi siajn korespondadojn nur en Esperanto laŭ la indiko sur paĝo dua de la kovrilo. Alimaniere la korespondadoj riskas resti sen atento.

Ni ricevas kelkiam sciigojn pri tre malnovaj okazintaĵoj. Tiajn materialojn ni plu ne publikigos. Sciigu pri ĉiu agado tuj post ĝia okazo.

Ofte oni sciigas al ni pri malfermo kaj fermo de kursoj. Malgraŭ ke tio estas unu el niaj gravaj aktivecoj, tamen nun en la tuta lando funkcias kursoj kaj la fakto mem ne estas aparte grava kaj interesa. Interese estas se ni prezentas al la legantaro iujn apartajn, nekutimajn elementojn en niaj korespondadoj. Oni devas fari analizon de la okazintaĵoj. Ekzemple oni sciigas pri fermo de kurso. La legantoj deziras scii, kiaj estas la rezultoj. Oni devas analizi la kaŭzojn de la sukceso aŭ malsukceso, fari konkludojn. Tiamaniere la informo, la raporto k.a. estus utila por la aliaj societoj. Ofte la korespondantoj pligrandigas la efektivajn rezultojn, laŭdas. Tio ne helpas la movadon. Naj faktoj devas esti veraj kaj ĝustaj.

La redakcio anoncis konkurson pri plej bonaj korespondantoj. Ni premias nur tiujn bonajn kaj regulajn korespondantojn, kiuj analizas la agadon, la E-eventojn, instruas kaj donas tre precizajn faktojn.

La korespondadoj kaj ĉio rilatanta la redakcion sendu nur al ĝia adreso: gazeto «Bulgara esperantisto», str. Dondukov 57 — Sofio.

La redakcio de «Bulgara esperantisto» serĉas por aĉeti malnovajn jarkolektojn de «Bulgara esperantisto» kaj aliaj E-gazetoj aperintaj en Bulgario.

Nekrologo

La 9-an de aprilo 1959 mortis samideano

IVAN K. GAĜEV

en sia 52-jaro. Li estis unu el la amikoj de Esperanto en Pazarĝik kaj longjara membro de la tiea E-societo «Radio». Niajn kondolencojn al la funebrantoj.

Pollando. Junaj esperantistoj — kun bulgaraj junuloj pri historio, literaturo, geografio, popolaj kutimoj, filatelio ka. Interŝ. bildkartojn. Adreso: Klubo de esperantistoj en Dzierżazno, Voevodio Gdansk.

USSR. Marija Komarova (kantistino), 9 linia 18, kv. 19, Leningrad V-4 — kun kantistinoj el Bulgario en E, rusa, bulgara aŭ franca lingvoj.

Ĉeĥoslovakio — ĈSR. Moldava nad Bodvou — ONV, Aleksandro Andreas — redaktoro de «Pokrokoy rol-nik».

USSR. Barnaul 15, str. 21 januaro 17-v, kv. 3 Perelman A. M.

Pollando. Kielce ul. Zeromskiego 26 Marek Kuryowicz, 15 jaraĝa — interesiĝas pri ŝakludo, libroj kaj ilustritaj gazetoj naci-lingvaj.

Japanio. Tokyo c/o Gifu-ryo, 62 Myogatai — mochi Bunkyo — ku

Bulgario. Kelkaj geknaboj (12-jaraj — kun junuloj eksterlandaj pri div. t. Interŝ. p. m. il. k. fotografaĵojn ktp. Adreso: Bulgario, Kazanlak str. Tulovo 1 Ivan Zahariev, instruisto.

Ĉinio. Wang Chongfang (studento de filologio kaj literaturo), Harbina pedagogia instituto, Leterkesto 126, Harbin, kun ĉl. pri ĉt kaj precipe pri literaturo, muziko kaj studenta vivo, interŝ. E-aĵojn.

Nova Esperantoasocio

Je la 11-a de aprilo jk en Pjenĝjano fondiĝis Korea Esperanto-asocio. En la sciigo estas dirite, ke KEA havas celon disvolvi la Esperanto-movadon en Korea popoldemokratia respubliko kaj kontribui al la mondpaca laboro.

UNUAMAJAJ GRATULOJ

Bulgara esperantista asocio ricevis unuamajajn gratulegramojn el Koreo, Ĉinio, Rumanio, Jugoslavio. CK de BEA esprimas koran dankon.

